

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale
PLENUMITA 26/03/2020 Kvarcentsepdekunua eldono (unua eldono 20/09/2011)



Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

Entute **713,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **277,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **233,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **203,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)


Nun preparas Esperantan programon por francoj. (Ekde junio 2020 ?)

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde julio 2020 ?)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

Gramatika serio “La Verbo en P.A.G.” N.ro.113



Plie al la proponeto (= *suggestion*) ke “Ŝi lavigas la knabon = Ŝi igas la knabon lavi” kaj ke “Ŝi lavatigas la knabon = Ŝi igas la knabon lavati, esti lavata, restas la problemo, ke en tiaj frazoj kun du Gramatikaj Objektoj la vicordo de la Objektoj devas esti ĝusta. Se mi volas diri ke la Patrino igas la patron lavi la knabon” mi ne povas diri “Ŝi lavigas la knabon la patron”. En tio do ekzistas strikta regulo de sisekvo, kiun oni povas ĉirkaŭiri nur per frazoj kiaj “La patron ŝi igas lavi la knabon” aŭ “La knabon ŝi igas lavati de la patro”, aŭ “Lavi la knabon ŝi igas la patron” kaj “Lavati de la patro ŝi igas la knabon”. Sed unu el la menciitaj frazoj oni devas uzi, se ne la knabo restas malpura.

Marcel Leereveld.



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE



DUOLINGO Vidu AE 469

Karaj,

Vera, vi certe pravus, ke Duolingo ne estas perfekta, sed la kreintoj de la kurso daŭre laboras por plibonigi la kurson. Estas malfacile pensi pri ĉiuj eblaj tradukoj, sed estus bone, ke vi kontaktu ilin ĉiun fojon kiam vi trovas, ke estas alia taŭga traduko. Ĉu vi rimarkis la butonon "Report"? Klaku kaj skribu la frazon kiu laŭ vi devus esti akceptata. Mi faris tion multfoje kaj ofte poste ricevis la mesaĝon "nun ni akceptas ankaŭ tiun tradukon". Tiel la kurso pli kaj pli boniĝos.

Amike, **Nicole Else**

Karaj,

Franciska faras demandojn pri Duolingo. Por ĉiu frazo la kreantoj devas entajpi ĉiujn eblajn tradukojn. Estas temporaba tasko kaj krome ne estas ĉiam facile pensi pri ĉiuj eblecoj. Tamen sur ĉiu paĝo estas la *butono* "Report". Tiun oni daŭre uzu, kiam oni pensas, ke alia traduko eblas. Mi multfoje uzis tion kaj poste ricevis mesaĝon, ke ankaŭ mia traduko estas nun akceptata. Se ĉiuj farus tion baldaŭ la kurso estus vere bonega kaj enhavus ĉiujn eblajn tradukojn.



Amike, **Nicole Else**

MALMOJOSA MI !!

Dankon Franciska kaj Nicole. Ho ve, mi ja montris (ankoraŭfoje?) mian malklerecon (kaj aĝon), nesciante la vorton "mojosa".

Tamen, estas malbona vento kiu blovas al neniuj valoroj. Certe, legantoj de AE kiuj, kiel mi, antaŭe ne konis tiun vorton, lernis modernan Esperanto-esprimon.

Mi treege ĝuis la ("iom malnovan") filmeton, Nicole, kaj esperas, ke ĝi varbis multajn gejunulojn al la Esperanto-mondo.



Vera Payne



Estrarkunveno 2020-03-19

Partoprenis Sandor, Jonathan, Indrani, Heather, Bradley kaj Ivan.

KORONA VIRUSO

Ĉiu informis la aliajn kiel la nuna situacio ŝanĝis iliajn vivojn. Ni diskutis kiel la viruso influos niajn kaj aliajn Esperanto eventojn kaj kunvenojn.

- Ni nuligis nian planitan arkivan laboron en Sidnejo post Pasko.
- Malgraŭ la nuna malbonega situacio, ni decidis daŭrigi nian preparadon por nia somerkursaro/kongreso en Sidnejo kaj esperas (ja nia devo!) ke ĝi okazos.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniuj informis AE

2021 KONGRESO/KURSARO EN SIDNEJO

NZEA oficiale informis nin, ke la venonta kongreso/somerkursaro ja estos komuna aranĝo. Bona novaĵo.

ESK

Ni gratulis Andrew Woods kaj Terry Manly pri la produktado de nia lasta eldono de "Esperanto Sub La Suda Kruco"



Venonta kunveno 2an de aprilo 2020.

Sandor Horvath



EL DANIO

Karaj samideanoj en Aŭstralio

Sole sidante hejme en mia loĝejo en Danio mi ĵus legis la saĝan artikolon de Marcel Leereveld. Pro la grava situacio mi restas hejme, butikumas rete kaj havas nur virtualajn sociajn kontaktojn. Laŭ mia opinio jen mia devo socia. Estante maljuna mi scias, ke la viruso estus al mi tre danĝera, kaj eĉ la tre bonaj malsanulejoj danaj ne povus samtempe kuraci milojn da tre malsanaj maljunuloj. Mi evitu la viruson.

Mi ne rajtas kritiki la registaron de via lando, sed mi volus laŭdi la agadon de la dana registaro. Ili severe agadas, sed ĉiuj partioj en nia parlamento apogas la registaron, ĉar la situacio estas tre grava. Iom post iom ĉio fermiĝas ĉe ni: lernejoj, bibliotekoj, bankoj kaj ĉiuj vendejoj krom tiuj, kiuj vendas nutraĵojn ktp kaj dentistoj kuracas nur akutajn dolorajn kazojn.

La ĉiutaga informado registrara estas malkaŝa, kaj pro tio oni estas fidema. Ili ankaŭ promesas financan helpon al firmaoj, kiuj memevidente perdas monon pro la krizo.

Mi deziras al vi ĉiuj ĉion plej bonan.

Amike

Betty Chatterjee Danio



Universala baza enspezo (UBI)

Tio helpas solvi ekonomiajn problemojn de la nuna mondo



La kovid 19 mondo bezonas novan ekonomian sistemon

Alie multaj malriĉegas. Universala baza enspezo (UBI) estas simpla ideo: perioda konstanta pago senkondiĉe transdonita al ĉiuj individuoj, sen rimedo-testado aŭ labora postulo.

Ĝi devos esti minimuma sed sufiĉe granda por ebligi ĉiujn vivi kun homa digno, kun manĝo kontraŭ mortmalsato, akvo, vestoj kaj loĝejo kontraŭ la klimato, elektro por komuniki kun la mondo ktp. La nunaj ekonomiaj sistemoj paneas ĉar multegaj homoj perdas siajn laborojn kaj eblecon aĉeti parton de la riĉecoj de la mondo.

La nun paneaj ekonomiaj sistemoj nur funkcias por profito de la riĉulojn ne la Homaro.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Kio estas mono? Registraroj neniam havas problemon financi militojn.



La batalo kontraŭ la viruso estas milito

Do prizorgu la homaron nun, ne nur la riĉulojn, bankojn kaj grandajn entreprenojn

Kion vi opinias?

Roger Springer

Kia stulta mondo !!

La monda problemo ne estas krei aĵon sed kiel doni al la homaro la eblecon havi parton de tiu riĉeco.

Nun la ekonomiistoj diras ke homoj devas aĉeti nenecesajn aferojn por subteni la ekonomion. Ili kredas ke la forĵetindaĵo (WASTE) povas savi la nunan ekonomion!

Kovid 19 montras la eraron de tiu kredo.

Laborpostenoj malgrandegas. La nuna ekonomia sistemo paneas kaj la popolo suferas. La mondo bezonas subtenon por ĉiuj. Eble pensio kiu ebligas akiri minimuman komfortan ŝirmejon, manĝon, vestojn, kaj edukon por ĉiuj.. Se oni deziras plu, ili rajtas labori por tio.

Roger Springer



Jen tre interesa filmeto

Esperantistoj el diversaj landoj rakontas pri siaj spertoj dum la virusa epidemio. Vi povas spekti Esperantiston ankaŭ el Melburno kaj unu el Novzelando.

https://www.youtube.com/watch?v=2fpM1ci_fMk

Amike, Nicole Else



Diskuto en la Anlga la unua kovida viktimo? <https://getaudiofromvideo.com/videos/videos?id=moT5qxeC6Fk>



"Qu'ils mangent de la brioche"

Marie-Antoinette (1755-93)

Let them eat cake

Ili manĝu buterbulkon



Potenculoj devas memori ke kelkaj vortoj povi ŝanĝi la mondon.

Homoj ne pace mortos pro manko de manĝo, sed ili murdas, ŝtelas, batalas por savi sin.



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE



La Manlia Esperanto-Klubo



Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10atm. Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagita kafo

atendos vin. La 21a de Marto estis la tria sabato de la monato.

Venis Roger Chris, John kaj Ian. La kafejo estis fremita dum la mateno ni sidis ĉe ĝiaj eksteraj tabloj kaj seĝoj. Ni sidis du metrojn aparte ĉar neniu alia ĉeestis la kafejon, Ni aĉetis la kafon el apuda kafejo. Kiel kutime ĝi estis bona kunveno.

Roger Springer




3ZZZ

En la elsendo de la 23a de marto eblas aŭdi intervjuon al Stefan McGill pri lia reveno al Novzelando post 40 jaroj kaj kelkajn informojn pri agoj kaŭzitaj de la kronviruso.

Mi devas ankaŭ averti la aŭskultantojn ke la radiostacio estos fermita ekde la 27a de marto. Ni provos tamen elsendi programon, eble ne tiom regule, aŭ almenaŭ provizi al vi muzikon de esperantistaj artistoj

Franciska Toubale



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE